

Heinrich Heine,
Akvoveturo

tradukita de Manfred Retzlaff

Ĉe l' masto min apogis mi
kaj nombris ĉiun ondon.
"Adiaŭ nun, patrujo vi!²
Mi volas en la mondon."

Ekbrilis la fenestroj de
la karulina domo,
rigardis streĉe mi, sed ne
mansvingis iu homo.

Vi larmoj, retenigu vi,
por ke mi ne blindigu!
Malsana kor', pro tic ĉi
doloro ne rompiĝu!

*Traduko de la Germana poemo "Wasserfahrt" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 1984.*

MR-167-1 / Arg-208-1367 (2012-11-26 07:56:15)

²aŭ:
"Adiaŭ, kara vi patri'!"